Neniam plu: Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Memoro de la Viktimoj de la Holokaŭsto, la 27-a de januaro 2024

Ĉiujare, la 27-a de januaro estas rekonata tra la mondo kiel Holokaŭsta Memortago, memorigata de Unuiĝintaj Nacioj kiel tago de speciala observo. Universala Esperanto-Asocio ligiĝas kun Unuiĝintaj Nacioj en notado de tiu memortago kaj funebrado de la viktimoj de la Holokaŭsto. Ĉirkaŭ ses milionoj da judoj, ĝis duonmiliono da romaoj, kaj enormaj nombroj da handikapitoj, tielnomataj degeneruloj, militkaptitoj, kaj diversaj etnaj kaj religiaj grupoj estis sisteme murdataj pro nesciencaj kaj atavistaj teorioj false bazitaj je heredo sed efektive naskitaj de malamo.

Inter la multaj viktimoj estis preskaŭ la tuta familio de L.L. Zamenhof, la fondinto de Esperanto. Nur unu nepo transvivis. En la unua kongreso de parolantoj de la internacia Lingvo Esperanto, en Francio en 1905, Zamenhof deklaris: “Hodiaŭ ne kunvenas francoj kun angloj aŭ rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.” Tra sia tuta vivo, Zamenhof kredis je la baza homeco de ĉiuj personoj, sendepende de iliaj originoj aŭ deveno. Estis tiu principo – ke ni ĉiuj estas homoj, meritaj je digno, meritaj je valorigo pro nia homeco, meritaj kunvivi harmonie kun aliaj homoj – kiu perdiĝis en la tragedio de la Holokaŭsto.

Ni, anoj de la Esperanto-movado, parolantoj de komuna lingvo el ĉiuj partoj de la mondo, funebras tiujn kiuj mortis, kaj ni promesas praktiki tiun humanecon, tiun respekton por ĉiuj homoj, kiu perdiĝis en tiu tragedio de la dudeka jarcento kaj kiu hantas homajn rilatojn eĉ ĝis hodiaŭ. “Neniam plu”, ni deklaras. Sed deklaroj eble ne sufiĉas: trovi la homecon en ĉiuj homaj estuloj devas fariĝi fundamenta principo se ni entute deziras superi la defiojn kiujn la homaro hodiaŭ frontas. Ni devas labori, konversacii kaj rezoni kune, se ni deziras, ke la homaro pluvivu kaj prosperu.